Ten slotte wordt nog over allerhande van gedachten gewisseld. Dhr. Debruyne uit Gent spreekt over de propaganda tijdens de Internationale Handelsfoor van

HENDRIK ADAMSON

1891-1946

le en Estonlando, la 7-an de marto pasinta, li faris sian lastan spiron: la senfinaj malsanoj, kiuj ade katenis lin, fine venkis lian korpon.

Malgraue li konstante verkis en la estona kaj en la esperanta, eĉ kuŝante; li post-lasis AŬLI kaj alian eldonotan novelon kaj poeziojn dissemiitajn kaj ne multnombrajn.

Popollerneja instruisto, kiu jam delonge ne povis daŭrigi sian profesian laboradon, li — kvankam Esperantisto nur de 1932, — funde posedis la vortotrezoron kaj sperte ekspluatis ĝin: li estis dotita per poeta animo kaj sentis la plaĉon kaj la valoron de la sonoj, de la ritmo kaj de la rimo, iam eĉ ebruigante de ili. La foje pesismistaj, foje ĝojaj, iam humanaj sentoj, kiuj stampas la naturobildojn, kiujn li skizas, kaj ĉiujn temojn, kiujn li ĉerpas kvazaŭ el propra mizero, propra sufero, mirinde trafe simbolas la persiston kaj senliman kuragon de konvinkita Esperanta poeto.

HEDERO.

Pianludanto

Dancas fingroj sur klavaro — grincas dentoj de luparo, plaŭdas hufoj sur glacio, tondras pafoj kaj ehadis krioj, krioj...

Dancas fingroj sur klavaro — grincas dentoj en arbaro... sed ekhaltis ĉaspelantoj kaj elsaltis el densej' mil feo-kantoj.

Fingroj dancas sur klavaro, feoj kantas en arbaro.

H. ADAMSON.



LA GRANDA AVENTURO KAJ ALIAJ NOVELOJ, de Ferenc SZUAGYI. Eldonis: Eidona Societo Esperanto, Stockholm. Dua volumo en la serio «Stelo-Libro»; 144 p. Mendebła ĉe Flandra Esperanto-Instituto. Prezo: broŝ. 78 bir.; vind. 87 bir. Rabatita prezo por membroj de Literatura Klubo «Stelo-Libro»; prospekto havebla ĉe F. E. I.

Printempa aperaĵo estas ĉi tiu libro, el kies folioj emanas laodoro de freŝa presaĵo, kian ni konis antaŭ la milito.

Kiel la titolo klarigas, ĉi tiu verko ne formas unu tuton kaj la diversaj noveloj estas eĉ heterogenaj. La malo mirigus post la averto de la aŭtoro: « La humoro de tiuj rakontoj — kelkfoje veraj, kelkfoje fantaziaj — estas varia: bonhumora, malgaja, satira aŭ tragedia. Ankaŭ la vivo estas tia. » Efektive, seriozeco kaj humoro rido kaj larmo alternas.

La dekkvar novelojn oni povus dividi en tri kategorioj: rakontoj pri la esperantista vivo (ili estas la plej bonhumoraj); rakontoj pri la milito (ili estas la plej bonaj); rakontoj pri ĝeneralaĵoj temoj (ili estas la malplej plaĉaj). Inter tiuj lastaj « La granda Aventuro » laŭ kiu la aŭtoro nomis la tutan kolekton. Ĝi montras per kio okupiĝas la spirito de nenifaranto; fakte tute ne pri granda aventuro!

La lingvo estas modela, la stilo laŭcir-konstante estas subtila aŭ reala, detala aŭ lakona, trankvila aŭ sprita sed ĉiam flua kaj klara. Ne malofte oni relegas frazon por duafoj ĝui ĝian ĉarmon.

Notindaj esprimoj inter multaj aliaj: foje foje orfolio lulas sin malsupren; super li tire pantofiloj la lacaj paŝoj; la polifonio de la ponta koncerto; pomadita minescias-kiu. « Pli serioze ŝi rigardis min kiel kvar-jaraj infanoj kutimas rigardi » (ol kvar-jaraj...).

Preseraroj nur sporadas. Bela papero, klara preso, beleta aspekto. Resume: malskreĉa, distra verko, bonege verkita de eminenta aŭtoro. Verda.

PENSJOJ DE ZAMENHOF. Eldonis: Svisa Esperanto-Societo en Bern. Dukolora preso, 32-paĝa. Mendebła ĉe Flandra Esperanto-Instituto. Prezo: 12 bir. broŝ.

Beleta broŝuro kies enhavo ne estas ampleksa sed sentoria! « La Espero » ĉe la komenco, kaj « La Vojo » ĉe la fino: inter ili 24 aforismoj ĉerpitaj el la verkoj de la Majstro kaj kiuj troviĝas en tiu kategorio de la esperantista vivo en la lingvo esperanta, franca, angla, germana kaj itala. Legante la verketon oni miras pri la daŭra aktualeco de la pensoj de Zamenhof! Aldonita propagandilo atentigas nesesperantistojn pri la facila akirebleco de la internacia lingvo. Bajo.

Vlaanderen gevoerd. Hij leest een verklaring van « Amika Rondo » (pl. vereeniging niet bij den Vl. Esperantistenbond aangesloten) die principiëel overeenstemt met de beginselverklaring door de vergadering aangenomen. Na een oproep tot de aanwezigen om zich ernstig op de statutaire bondsvergadering van December voor te bereiden sluit de Voorzitter de vergadering om 18 u. 30.

Na de vergadering volgde tot 22 u. een gezellig samenzijn in de stemmige lokalen van de Vlaamsche Club. Zooals gebruikelijk is zorgde het Vl. Esperanto-Instituut voor een boekenstand.

De Secretaris: G. DEBROUWERE.

LA BATALO DE L'VIVO. Verkis originale en la angia: Ch. Dickens; tradukis el la germana: D-ro L. L. Zamenhof. Eldonis: Libro-Servo de F. L. E. en Amsterdam. 120 p., ilustrita. Mendebła ĉe Flandra Esperanto-instituto. Prezo: 27,50 bir. broŝ.

La leganto prave miras, ĉar la majstro tradukis la verkon el traduko, dum li sciopovas la anglan. Sed sur aparta paĝo, « Al la Legantoj », — fotokopio! — Zamenhof mem klarigas: « ...unu sinjoro montris al mi germanan libron (tradukon de verko de Dickens) kaj diris: ĉi tion oni certe ne povus traduki en Esperanton. Por konvinki tiun sinjoron, ke li eraras, mi prenis la libron kaj tradukis ĝin. »

La esperanta traduko aperis en « La Esperantisto », en 1891. Ĉar tiu gazeto ne plu estis havebla, oni decidis pri dua eldono de la esperantigita verko. La interesiĝo de la esperantistaro por ĝi pruvas la nuna tria eldono.

La orfa Alfred Heathfield pasigis siajn infanaĝon kaj frujunecon inter la du filinoj de kuracisto Jeddler. Fatale: li enamigis en la belan Marion. En la trijara forrestado de Alfred, vundita rajdisto pasigis ses semajnojn en la kuracista domo kaj, same fatale, enamigis en Marion. Alfred anoncas sian revenon, sed Marion forkuras... Kial? Kun kiu? Kien? Ĉi ĉion la plua rakonto malkaŝos kaj... ĝi rezervas surprizojn!

Lingvo kaj stilo estas kompreneble « zamenhofaj ». Oni do ne miru pri ekscesa uzo de « unu » kaj « ad », pri ŝajne maloportunaj, eĉ superfluaĵoj « ĝi », pri longaj frazoj kun korelativoj kaj prepozicioj nun ofte facile forigeblaj. Plie, pluraj esprimoj elmodiĝis, ĉar Esperanto, kvankam fidela al sia fundamento, senkonteste evoluis, kaj ĉi tio estas la plej persvada pruvo pri la vivo de nia kara lingvo.

Oni facile konsentos ke la libro ne taŭgas por komencantoj. Aliflanke, ĝi tre interese fervorajn, studemajn progresintojn, kiuj ŝatas posedi verkon el « la unuaj jaroj de la ekzistado de Esperanto », tradukon « el la plumo de la majstro ».

Kelkaj prilingvaj rimarkigoj el tuta serio: « La kampisto, kiu tie plugadis... » (p. 10); « Si estis tre juna, kiam ŝi fianĉiĝis » (p. 48); baldaŭ sin trovos Alfred kun lia juna edzino » (p. 71). Notindaj esprimoj: « La fajro estis la genio de la ĉambro » (p. 78); « La mondo fariĝis ses jarojn pli maljuna » (p. 85). Preseraroj preskaŭ tute forestas. Tamen: Zamenhof (!) sur la titolpaĝo!

Bonega papero, klarlitera preso, afabla aspekto. Verda.

UNE HUMANITE, UNE LANGUE, de S. Glodeau. Eldonis: SAT-Amikaro, Paris. Ilustrita, 72-paĝa, prezo: 35 fr. fr.

Broŝuro franclingva, speciale verkita por la propagando inter laboristoj; plaĉe eldonita kaj lerte kompilita. Ĝi ekzistas ankaŭ en la primovada historia dua parto, kiu interesas nur la jamajn esperantistojn. La unua parto, 48-paĝa kaj aparte akirebla por 25 fr. fr., traktas pri la neceso kaj la historio de la mondlingvo, ĝia valoro lingva, eduka kaj ideologia.

Pri la titolo ni stumblis: « Une humanité, une langue » povas veki la impreson, ke ni celas ke Esperanto fariĝu la nura lingvo de la homaro. Kia ajn estu la persona konvinko de la aŭtorino, tia titolo nur grave povas malpliigi la propagandan valoron de la verketo. E. C.

MI SERĈIS ORON KAJ OLEON, SED TROVIS... de David Flood; el la sveda tradukis: Karl Gustafsson. Eldonis: Eidona Societo Esperanto, Stockholm. Tria volumo en la serio «Stelo-Libro»; 132 p. Mendebła ĉe Flandra Esperanto-Instituto. Prezo: broŝ. 72 bir.; vind. 81 bir. Rabatita prezo por membroj de Literatura Klubo «Stelo-Libro»; prospekto havebla ĉe F. E. I.

Konata temo. Tamen ĉi-foje ne libro, kiu « odoraĉas je viskio » kaj kunlaĉas nur sovaĝajn interbatadojn, sed figurado de honesta orserĉisto aŭdacca, sentima antaŭ ĉiam minacanta morto, persistema malgraŭ ĉia malsukceso. Kvazaŭ li sidus en amikara rondeto interesiĝanta pri ĉia vorto el lia buŝo, li rakontas pri danĝerplenaj ekspedicioj en frostkatenitaj vastajoj, pri arbarbruloj, pri banditoj kiel ankaŭ pri ĉiaspecaj — por la leganto — malpli gravaj okazintaĵoj aŭ aŭditajoj, konsciencie alproĉataj al la rakonto. Jen parolas la esplorvojaĝinto pri moroj ĉe indianoj aŭ eskimoj, jen li iom profese instruas pri geologio rilate oleboradon aŭ radiumon. Dume daŭre ekflamas liaj amo por, kaj fiereco pri la patrolando: Svedujo, kiun, elreviĝinte post la fiaskinta granda striko en 1909, li forlasis por konstrui al si pli homindan estontecon en la lando de liberco: Ameriko.

En cetera simpla lingvo okulfrapas la ofteco de neologismoj (vigvamo, igluo, antiklinalo, peĉbiendo, konfeto, supeo, k. a.) ofte necesaj (slum-kvartaloj, avanci, solitero, obskuro, asortilo, spurto, k. a.). Ĉu ne ĉuj uzitaj usone-anglaj vortoj (bums; Stick 'm up!) estu tradukitaj? Misuzitaj vortoj: penetriĝi (penetri), tonelo (tuno), veturigi hundojn (konduki), k. m. a. Tre oftas la pleonasma « pli poste » kaj la prepozicio po estas fuŝe uzita. Evitinda ankaŭ estas la kunmetoj adj.-subst.: plenbarbo, bluflava.

Klara preso, bonega papero, plaĉa aspekto. Fr. C.

LA VIRINETO EN BLUG KAJ ALIAJ RAKONTOJ de Mason Stuttard. Eldonis: The Esperanto Publishing Co. Ltd, Rickmansworth; 150 p. Oka volumo en la Epoko-Serio. Mendebła ĉe Flandra Esperanto-Instituto. Prezo: 30 bir. kart.

Romantikaj, bonhumoraj, ironiaj, misteraj, tragikaj rakontoj en bona lingvaĵo kaj en stilo kiu karakterizas anglajn aŭtorojn. En tri el ili la verkisto pritraktas la vivon de esperantistoj kaj akcentis ke esperantuto estas la rifuĝejo de ĉiuspecaj ekscentuloj. Bedaŭrinde en tiu konstato troviĝas granda vero, kaj la malutilo kiu el tio rezultiĝas por nia afero estas nealkulebla.

La aŭtoro uzas « rekoni » en la senco de « agnoski »; li uzas « pundo » anstataŭ « funto » (sterlinga), kio jam iĝas kutima.

Laŭdi la aspekton estas tute superflua: la Epoko-libroj estas jam sufiĉe konatoj. Ni nur atentigas la eldonistojn pri la finaj literoj de la linioj, kiuj diversloke ne alĝustigis al la komponistoj. Bajo.

LA VIDVINETO de J. de Atencar. El la portugala tradukis: L. C. Porto Carreiro Neto. Eldonis: Brazilia Ligo Esperantista, Rio-de-Janeiro; 87 p. Prezo: nemontrita.

La verkisto estas konata kiel unu el la plej legataj kaj fekundaj aŭtoroj sialandaj. « La Vidvineto » rekondukas nin en la pasinton, kaj kun ioma melankolio ni revas pri la dolĉa, sensuka vivado de la esinta tempo. La historio de la juna, apenaŭ dekkvinjara vidvino ni sekvas ĉarmitaj per la naiveco de la simpla rakonto. Ni havis la impreson kvazaŭ ni aŭskultis simpatian maljunan personon rakonti propran vivon.

Rekomendinda verketo en beleta ekster-rajto. Alex Jossen.

PAC-PLANOJ « LAŬ LA KARTO ». Eldonis: Nacia Oficejo « Campaign for World Government », Chicago, Usono. Ilustrita, broŝurita, 8-paĝa. Prezo: unu respondkupono.

Sub lozungo « Mondfederaciigo aŭ pereu! » ekzistas en Usono, ekde 1937, « Kampanjo por Mond-Registaro », organizo kiu celas la starigon de mond-federacio de unuigitaj ŝtatoj.

Tre logike ĝi faras sian propagandon ankaŭ en la mondlingvo. La broŝureto koncize skizas la diversajn pacplanojn kaj resume finas per pledado por ĉesi senesperajn eksperimentojn kaj por entrepreni la konstruon de la Mondfederacio.

Dorno.

ĈU VI JAM POSEAS

La ilustritajn popularsciencajn kajerojn verkitaĵn de

Prof. AGOSTINHO da SILVA :

LA ARANEOJ

LA VIVO DE L'ESKIMOJ

LASTA VOJAĜO DE SCOTT

VIVO KAJ MORTO DE SOKRATO

PICCARD EN LA STRATOSFERO

Po kajeroj: bfr. 6. La serio: bfr. 25

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO

Nur kelkaj kompletaj serioj haveblaj!

Plaatselijk Nieuws

ANTWERPEN. — Esperanto-Komitato Intergrupa breidit immer zijn werking uit. De voordracht met lichtbeelden door dhr. Van Eynde was een succes. Op Woensdag 6 November werd het een smalfilm-avond verzorgd door dhr. Lernaut. Dr. T. van Gindertaelen sprak over de fonetiek in de internationale taal.

In de school der Eikenstraat gaat een Esperanto-cursus door in het kader der gemeentelijke avondleergangen.

BLANKENBERGE. — Twee cursussen zijn alhier in voorbereiding. Ingevolge de internationale conferentie van de Esperanto-jeugd die te Blankenberge in Augustus gehouden werd, is de belangstelling voor Esperanto merklijk toegenomen.

BRUGGE. — Een geslaagde propagandatocht voor het wereldpetitionnement voor Esperanto werd door de plaatselijke afdeling van den Vlaamsche Esperantistenbond op touw gezet: in het drukke stadcentrum werd met spandoeken en twee tafels post gevat. Onze meisjes in witte bloese met groene ster noodigden de voorbijgangers uit het petitionnement te onderteekenen. Het werd een gedrum van belang, het verkeer werd een oogenblik gestremd maar op geen tijd waren de honderden verklaringen die het Vlaamsche Esperanto-Instituut ons bezorgd had, onderteekend. Jammer dat we niet over een paar duizend beschikten!

Twee cursussen zijn in voorbereiding, waarvan een voor jongeren onder de achttien jaar.

BRUSSEL. — Op Zondag 3 November jongstleden greep alhier de algemeene jaarvergadering plaats van Esperanto-Komitato Intergrupa. De standregelen werden door de vergadering goedgekeurd en het bestuur herkozen.

Op Zondag 15 December a.s. in de zaal der Rollebeekstraat 7: Zamenhoefste. Een danspartijtje zal dezen feestavond besluiten. Kaarten à 10 fr. zijn verkrijgbaar in den Esperanto-boekhandel (hoek Bodendrook- en Regentiestraat).

In de stadsschool der Ernest Allardstraat gaat een Esperanto-cursus door in het kader der gemeentelijke avondleergangen.

GENT. — In navolging van Antwerpen en Brussel werd alhier een Esperanto-Komitato Intergrupa opgericht.

Twee cursussen gaan door in de Volkshoogeschool der Tarbotstraat.

MECHELEN. — In « De Groene Lantaarn » organiseerde de plaatselijke afd. van den Vlaamsche Esperantisten-Bond een cursus voor beginners. Tevens werd aangevangen met een leergang voor gevorderden voor de leerlingen van verleden winter. Dit alles ten gevolge van een geslaagde propaganda-avond met Esperantotentoonstelling waarop de heer J. Brouwers, ingeleid door Dr. T. van Gindertaelen, voor een talrijke schaar belangstellenden het woord voerde.

BLANKENBERGE

Internationale Conferentie van de Esperantisten-Jeugd



Jonge Esperantisten van zeven verschillende nationaliteiten verbroederden aan de Vlaamsche kust in Augustus jongstleden.

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ kun premioj

ATENTU: La regularon bonvolu legi en la januara numero!

PREMIO: Post la 15-a enigmo gajnis la premio: Verda, kiu ricevis « Surprijzoj » de Ina Boudier-Bakker (« Wat komen zal », en Esperanto-traduko de Tekla Flint).

Sekvas kun 6 poentoj: Popelier St., Roose R. A.; kun 5 poentoj: Deckers, Lodema, Maertens, Roose M. L.; kun 4 p.: Bernaert, De Baets, Haneveir, Iserentant; aliaj kun malpli.

SOLVO DE LA 16-a ENIGMO

HORIZONTALA. — 1. istm.; meduzo. — 3. gravur.; naso. — 4. ar.; var. — 5. ondrompilo. — 6. ni.; si. — 7. subita; ok. — 8. ke.; op. — 9. ag.; ne.; konk. — 10. ind. — 11. plag.; asteri

VERTIKALA. — 1. karp. — 2. strand-seg. — 3. ard. — 4. mev.; baniĝ. — 5. en. — 6. marpono.; da. — 7. mia — 8. dun.; boat. — 9. aviso. — 10. salikok. — 11. odoro.; podi.

17-a ENIGMO: SANGENIGMO

Trovu kvarliterajn radikojn, respondantaj al la donitaj indikoj, laŭ la jena procedo: forigu unu literon el la unua vorto, aliordigu la postrestantaj kaj aldonu novan por formi la duan vorton, k. t. p. ĝis sub 20 vi retrovos la saman vorton kiel sub 1.

1. Ĝi estas eksplodema. — 2. Ĝi troviĝas sur birdo. — 3. Lumigilo. — 4. Vesto. — 5. Estanta post ĉiuj ceteraj. — 6. Ĝi lumas nokte. — 7. Forte sin levi de tero. — 8. Resti senmove, plejofte vertikale. — 9. Kartonfolio. — 10. Plekti fadenojn per speciala ilo. — 11. Spaco apud domo. — 12. Kvarpedulo. — 13. Besta korpoparto. — 14. Senangula. — 15. Ceremonia seĝo. — 16. Hazardo. — 17. Besta korpoparto. — 18. Trovi respondon al demando. — 19. Malpurajo. — 20. Sama vorto kiel sub 1.

Sendu la solvon al la redakcio antaŭ la 20-a de decembro!

ANONCETOJ

Ĉiu vorto aŭ mallongigo: 0,75 bfr.
Enpresigo kostas minimume 15 bfr.
Unu int. respondkupono valoras 3,50 bfr.

TRE PLACAĴN POSTKARTOJN, tre efikaj por la propagando, ĵus eldonis F. E. I. Uzu ilin por via korespondado. 100 ekz. kostas 25 bfr. (sekcioj de Fl. L. E. ĝuas rabaton de 10%).

JUNA E-ISTINO 21-jara dez. kor.: Virginija Vasileva, Str. Panagjuŝtu 3, Sofia, Bulgarujo.

ABONU « American Esperantist » por 65 bfr. ĉe F.E.I. Dulingva (angla kaj esperanta) revuo, vere interesa kaj ampleksa (24-paĝa). Aperas sesfoje en la jaro.

ABSTINENCULOJ renodu int. kontakton! Anoncu vin ĉe s-ro Ben Dudink, IJsbaan, Zandijk, Nederlando.

« INTERNACIA KULTURO », grandformata, 16-paĝa, multilustrita revuo aperas 16-foje en la jaro kaj estas abonebla ĉe F.E.I. por 125 bfr.

JUNA BULGARO, 25-jara, dez. kor. kaj interŝangi p. m., donacetojn, ktp. Fodor D. Kostov, Caribrod 3, Plovdiv, Bulgarujo.

« HEROLDO », la sendependa, duonmonata, grandformata int. gazeto estas abonebla ĉe F. E. I. Kiu nun pagas 100 bfr. tuj ricevas la gazeton kaj restas abonanto ĝis septembro 1947!

INTERSANGAS bildkartojn kaj p. m. (ankaŭ serĉas adreson de kantistino Monika Viane): Johano Javernik, Voitsberg, Postf. 2, Steiermark, Aŭstrujo.

KUN LERTA FLANDRA E-IST(INO) dez. kor. Juan Régulo Pérez, Cabrera Pinto, 30, La Laguna (Tenerife), Kanariaj Insuloj.

VIENANOJ, membroj de E-grupo « Libereco », dez. kor. kun flandraj gesamdeanoj. Adreso: Wien 12, Gaudensdorfergürt. 11, Aŭstrujo.

CAPITRO 16-a

« Nu, ĉu rezultato? »
Doktoro Gulopez revenis al la realo. La vogleco de Kant tuj frapis lin.
« Ne tre speciala, mi timas », kaj li koncize konigis sian enketon al la spuristo.
« La familio Steinmann nepre montris sin ne simpatia », Kant koncedis, « kaj ankaŭ Higgs gardas sian langon kiom li volas. »
« Ĉu vi pli sukcesis? »
« Jes, kaj ne. Mi ĉiukaze scias ion pli pri la rilatoj Maxton-Dubois unufanke kaj Maxton—de la Fosse aliflanke. » Siavice Kant grandtrajte komunikis siajn konstatojn.
« Kaj la bruo en la koridoro? »
« Tion mi ja malkovros. Kaj kion vi faris tie ĉi? »
« Mi pristudis la portreton de la filino de Maxton. »
« Aktuale la sefo, kiu malantaŭas ĝin, pli interesas min. Mi ne scias kial mi ne ordonas traŝalmi tiun ĉi ajon. Tia ĉifroseruro... ha! mi havas ideon. Ni foje provu « Elly ». »
La seruro ne cedis. Kant perdis esperon.
« Do, ne. Nu, ĉiu pafo ne estas trafo. Mi tamen ne plu paciencon longe. Mi volonte parolus refoje kun la notario. Ĉu vi ne ŝatas akompani min? »
Doktoro Gulopez tuj pretis. Kiam ili estis enlasataj ĉe Majstro Van der Meersch, ĉi tiu estis studenta aktaron. Li vere personigis la komplezon. La sinjoroj sidigu! Kaj ĉu li prezentu ion al ili?
« Ni disponas nur paron da minutoj, sinjoro Notario. Temas simple pri kelkaj pluaj informoj. Ĉu vi certas ke Dubois ne edziĝis al Elly Maxton? »
« Nepre. Leĝa edziĝo neniam okazis. Dubois sendube asertis ke tie ili iel geedziĝe kontraktis, sed leĝe ĝi tute ne validis. Mi nepre scias tion, ĉar mi faris la necesajn esplorojn koncerne la redakton de la testamento de sinjoro Maxton. »
« Ĉu Dubois sciis ke li ne heredos multon? »
« Ne. Li estis konvinkita pri la malo. »
« Kiel vi scias tion? »
« Li ripete komprenigis tion al mi. »
« Nun, Majstro, mi revenas momenton al la afero de la « Iron and Steel Corporation ». Ĉu la aĉetordono de tiuj akcioj ne ŝajnis neordinara? Vi ja ne estas makleristo? »
« Ne ĉiu ĉiam balaas antaŭ propra por-do, sinjoro Kant », ruzete ridis la notario.
« Certe okazis pli ke sinjoro Maxton ne-rekte faris borstransakciojn por aĉeti aŭ vendi iujn valorojn, ne tro atentigante pri si. »
« Ĉu vi funde konas borsaferojn, Majstro? »
Sajnis al Kant ke la notario ekrimis.
« Funde? Mi posedas ja iom pli ol elementajn nociojn. »
« Ĉu vi scias ion pri la antaŭa vivo de Maxton? Mi celas: antaŭ kiam li venis Eŭropon. »
« Tre malmulte, sinjoro Kant. Tre, tre malmulte. Mi kredas ke ĉi tie neniu scias multon pri ĝi. »

JAĤTO VETURAS EL...

« KRIMINALA ROMANO »

Tradukis : Dro T. Ken.
Verkis : Deck Dorval.

La notario karesis siajn lipharetojn. Kant firmtenis lin.
« Kaj la malmulto kiun vi scias, sinjoro Notario? »
« La malmulto? Sinjoro Maxton postulis ke mi tenu ĝin en sekreto. »
« Ĉu la postulo ankoraŭ validas nun? »
« La postulo? Jes, kompreneble, ĝi ankoraŭ validas. »
Kant ne deklaris sin venkita:
« Ĉu nun, post duobla krimo, tio ne estas iom senresponda, Majstro? »
« Duobla krimo? » miris la notario.
« Ĉu vi ne jam scias ke Jean Dubois mortis? »
« Kio? Dubois mortis!... Notario Van der Meersch saltrektigis kaj lia vizaĝo senkorligis. En liajn okulojn venis preskaŭ ireneza esprimo. »
« Jes », Kant konfirmis, « ankaŭ li estus murdita. »
« Murdita! Kaj kiu estas...? »
« Tion ni esploras. » Sekve insiste: « Ĉu post tiu ĉi nova krimo vi ankoraŭ deziras teni en sekreto kion vi scias, Majstro Van der Meersch? »
La notario hezitis plu, kvazaŭ meditante kiom lia devo trudis al li la silenton. Tiam sonis decido:
« Vi pravus, sinjoro Kant. Sinjora Maxton ricevis karceropunon en Usono. » Li lasis siajn lipharojn kaj atendis:
« Kiam? »
« H'm. Proksimume antaŭ tridek kvin jaroj. »
« Pro kiu faro? »
« Onidire, ĉar li misuzis ies fidon kaj trompoŝtelis lin? »
Ne eblis decifri impreson sur la vizaĝo de Kant. Li senkompate daŭrigis la pride-madon:
« Kiel sinjoro Maxton konfidis tion al vi? »
« Mi eksciis tion kiam mi reguligis lian naciangon. Li postulis ke mi strikte gardu tion por mi kaj li certigis ke, kvankam leĝe kulpa, li persone ne estis riproĉebla. Li ne diris pli. »
« Ĉu vi scias ion pri lia edzino? »
« Ne. Mi certe legis ŝian fraŭlinan nomon en la dokumentoj, sed mi ne plu memoras ĝin. Sia antaŭnomo estis, se mi ne eraras, Jane. »
« Ĉu vi postagmeze ne estis en la koridoro, supre? »
« En la koridoro? Jes, nu, ĉirkaŭ... iom malantaŭ la dua. »
« Ne, mi celas: pli malfrue, almenaŭ unu horon poste. »
« Maleble. Ĉu vi opinias ke vi vidis min? Tiam vi certe eraris. Tiu ĉi aktaro okupas min jam minimume du horojn. »
« Ĉu vi sciis ke Dubois konsumis multajn pulvorajojn kontraŭ kapdoloro? »
« Kompreneble, tion sciis ja ĉiu! »

Kant ŝajnis sufiĉe informita. Doktoro Gulopez atendis tion por siavice direkti paron da demandoj al la notario.

« Majstro Van der Meersch, ĉu pasint-nokte vi eble aŭdis, ĉirkaŭ la duono malantaŭ la dua, bruon en la koridoro? »

« Bruo? Ne. Tamen jes, ĉar vi diras tion, jes. Sed mi ne atentis ĝin. »

« Kia estis la bruo? »

« Mi pripensu. Estis kiel se iu lasis fali ion kaj sakris. Sed mi ne certas. Estis nur malpreciza bruo. Tre malpreciza bruo. »

La notario parolis rapide, reve. Lian kapon rompilo alia. Sed Dubois murdita... tio estas, tio estas... ĝi ne havas sencen... Devas esti ago de frenezulo, sinjoro Kant!

« Ĉiukaze, danĝera frenezulo. Nu, sinjoro Notario, ni ne plu bezonas vin. Ĝis revido. »

Ili lasis la notaron mediti sola kaj ankoraŭ aŭdis kiel li ŝosis la pordon malantaŭ si.

Kant rikanis.
« Venu, Doktoro, alia vizito. »

Ili iris tute malantaŭen en la koridoro. Flanke de la ĉambroj de la geedzaj Steinmann ili trovis la filon en lia kajuto.

La juna viro fumante sidis sur sia lito, kaj Kant rimarkis ĉe la stumpejoj ke jam mirinde etaj cigaredoj malaperis en fumon.

Liaj etaj, ruĝaj okuloj, sub larĝaj, bluaj cirkletoj konturigis, timoplenis kaj videble neniam kapablus rigardi iun rekte en la vizaĝon. Krome la juna viro ree iom ebruis, kio cetere ne estis tiom malaŭta.

« Nu! Kion vi deziras? » li malbonhumore demandis.

« Mi devas fari paron da demandoj al vi », Kant mallonge diris.

« Kion vi devas demandi? » Sur la stumpe de fumita cigaredo alia estis bruligita. Liaj manoj tremis.

« Kion vi ĉi-posttagmeze faris en la kajuto de Dubois? » Kant blufis.

La cigaredo falis sur la plankon.
« Mi? Mi... ne estis tie. » Alex Steinmann levprenis la cigaredon por gajni tempon kaj stulte ridis.

« Nu! Ĉu vi tute certas? »

Li momenton timeme levis la okulojn, kiuj tuj poste ree direktigis suben.

« Mi kompreneble certas pri tio. Mi mem ja plej bone scias! »

« Kaj se oni vidis vin? »

« Estas mensogo, estis neniu... »
Li lipmordis. Li diris tro. La dama alkoholo, kaj nun ĝuste kiam li ne bezonis vaporon en la kapo!

« Vi estis tie, Alex Steinmann! Kion vi faris tie? »

« Ne venis respondo. »
« Mi diros al vi, sinjoro Steinmann, kion

vi faris tie... »
« Ne estas vere! »
« Plene veras. Vi ŝtelis la paperojn de Dubois. Kie ili estas? »
« Mi ne havas paperojn! »
« Kie ili estas? »
« Lasu min trankvila. Mi senkulpas. »
« Kial vi murdis Dubois? »
La juna Steinmann ĝemante rektigis. Lia vizaĝo terure kunfirigis.
« Ne, ne ne! Ne estas vere! »
« Kiu murdis Dubois ankaŭ murdis sinjoron Maxton. » La vortoj de Kant vipe skurgis. Doktoro Dubois preskaŭ kompatis la torturaton.
« Kial vi murdis Maxton, Alex Steinmann? »
La juna viro refalis sur la lito. Cio en li ŝajne rompiĝis. Li lamentis.
« Sufiĉas! Sufiĉas! Mi ne faris, mi juras! Per Dio! mi juras tion. Mi povas pruvi tion. »
Doktoro Gulopez opiniis ke Alex Steinmann tuj falos sur la genuojn.
« Pruvi! » Kant incitis. « Ĝin vi ne povas! »
Li ludis per la viro kiel kato per muso.
« Ek, konfesu », Kant iom pli fingroŝraŭbis.
Alex Steinmann mankovris sian vizaĝon.
« Mi... mi ŝtelis la paperojn! Jes, tion ĉi mi konfesas. Sed, mi ne estas murdanto. Mi juras ĝin! Hieraaŭvespere mi estis tie ĉi, en tiu ĉi kajuto, sinjoro Kant. »
« Jes, kaj la tutan nokton vi komforte kaj tutsola trinkis glaseton de tempo al tempo. Eĉ ankaŭ fumis cigaredon, ĉu ne? » Kant mokridis.
« Jes, estas vere, mi tro multe trinkis. Mi malsanis. »
« Nu, vi malsanis! Sinjoro Steinmann, ĉu vi bonvolas noti ke vi elĉerpis mian paciencon. Ni ne venis tien ĉi por estis mokataj de ebrulo. Komprenite? »
« Sed, sinjoro Kant, mi diras ja la veron al vi! »
La viro nun ŝajnis tute malebriiginta kaj iom post iom komplete ekkonsciis sian situacion.
« La paperojn, mi jam diris al vi, mi ja ŝtelis. Mi nur estu ne farinta tion! Kial vi tiel torturas min? Demandu mian patrinon, tiam vi estos konvinkita. »
« Vian patrinon? Kion ŝi scias pri tio? »
« Demandu ŝin, sinjoro Kant. »
« Sed, vi estis sola tie ĉi. Kion via patrino povus scii pri tio? »
« Ne, mia patrino... mia patrino estis ĉi tie. »
« Ulo, ne tiel provoku la ĉielon per viaj mensogoj! » Kant tondris.
« Mi ne mensogas. Lasu min findiri. Mia patrino estis tie ĉi kun... »
« Kun kiu? »
« Kun Profesoro De Groot... »
(Daŭrigota.)

Verantw. uitgever F.E.I. — Bestuurder : E. Cortvriendt, P. van Humbeekstraat 3, Brussel. — Drukkerij A. Hessens, Komediantestraat 12, Brussel.